

# MESAĜO DE ‘ABDU’L-BAHÁ\*

de la 17-a de decembro 1919\*\*  
al la Centra Organizo por Daŭra Paco,  
Den Haag, Nederlando

*Al la sekretarioj 19 Prinsengracht, Den Haag, Nederlando*

*La ekzekutiva komitato:*

*D-ro H.C. Dresselhuys, prezidanto (Nederlando)*

*Th. barono Adelswaerd (Svedujo)*

*Prof-ro R. Altamire (Hispanujo)*

*S-ino Fannie Fern Andrews (Usono)*

*G. Lowes Dickinson (Grand-Britujo)*

*Mgr. D-ro A. Giesswein (Hungarujo)*

*Prof-ro D-ro H. Koht (Norvegujo)*

*Prof-ro D-ro H. Lammasch (Aŭstrujo)*

*Prof-ro D-ro Achille Loria (Italujo)*

*Paul Otlet (Belgujo)*

*J. Scherrer-Fullemann (Svedujo)*

*Prof-ro D-ro Walther Schücking (Germanujo)*

*Th. Staunig (Danlando)*

*Jh D-ro B. de Jong van Beek en Donk, ĝenerala sekretario (Den Haag)*

Ho vi atestimataj, kiuj vi estas pioniroj inter la bonvoluloj en la mondo de la homaro!

La leterojn, kiujn vi estis sendintaj dum la milito, mi ne ricevis, sed unu letero de la 11-a de februaro 1916 ĵus atingis min kaj nun senprokraste sekvu la respondo. Via intenco meritas miloblan laŭdon, ĉar vi servas al la homa mondo, kaj tio ĉi gvidas al feliĉo kaj bonfarto de ĉiuj. Tiu lastpasinta milito pruvis al la mondo kaj al la popoloj, ke milito estas detruo, sed mondpaco estas konstruo. Milito estas morto, sed paco estas vivo. Milito estas rabemo kaj sangavido, sed paco estas bonfaro kaj humaneco. Milito apartenas al la mondo de naturo, sed paco al la fundamentoj de la religio de Dio. Milito estas densa mallumo, sed paco estas ĉiela lumo. Milito estas detruanto de la homara strukturo, sed paco estas la eterna vivo de la homa mondo. Milito similas sovaĝan lupon, sed paco la anĝelojn de la ĉielo. Milito estas batalo por vivo, sed paco estas reciproka helpo kaj kunlaboro inter la popoloj de la mondo kaj kaŭzas plaĉon al la Unusola Vero en la ĉiela regno.

Ekzistas eĉ ne unu animo, kies konscio ne atestus, ke nuntempe ne ekzistas iu pli grava en la mondo ol la mondpaco. Ĉiu justa homo konfirmas tion ĉi kaj alte taksas tiun ĉi honoratan societeton, ĉar

---

\* Esperanta traduko aperis en 1964 en Germanio kun jenaj indikoj:

La Nacia Spirita Konsilantaro de la Bahaanoj en Germanujo

Der Nationale Geistige Rat der Bahá'í in Deutschland / Frankfurt am Main

Tradukita el la Perso [sic!]

© Bahá'í-Verlag GmbH, Frankfurt am Main 1964 (Bahaa jaro 121)

Druckerei Tübinger Chronik, Tübingen, Uhlandstr. 2

La traduko tie ĉi estas tiu de 1964 revizita kaj kompletigita per la fine menciita letero, kiu novtradukitas.

\*\* Tiu ĉi estas la respondo de ‘Abdu’l-Bahá al letero adresita al Li de la Ekzekutiva Komitato de la Centra Organizo por Daŭra Paco. La letero, kiun Shoghi Effendi in God Passes By priskribis kiel de „tre influhava graveco“ (“far-reaching importance”) kaj datita la 17an de Decembro 1919 estis ekspedita al la Komitato en Hago pere de speciala delegacio.

ĝi celas transformi tiun mallumon en lumon, tiun sangavidon en bonecon, tiun torturon en ĝojegon, tiun mizeron en bonstaton kaj tiun malamikecon kaj malamon en kamaradecon kaj amon. Pro tio la klopodo de tiuj ĉi estimataj animoj meritas aprobon kaj laŭdon.

Sed saĝaj animoj, perceptantaj la esencajn rilatojn inter la realaĵoj, scias ke iu unuopa, unusola afero ne povas tiom influu la homan realaĵon, kiom tio estus necesa kaj devus esti, ĉar neniu grava afero estas atingebla antaŭ ol la opiniaro de la homoj estos unuigita. Hodiaŭ la mondpaco estas tre grava afero, sed esenca estas la unueco de la konscio pri tio, por ke la fundamento de tiu afero estu sekurigita, ĝia fondaĵo solida kaj ĝia strukturo fortika.

Tial Lia sankta moŝto Bahá'u'lláh antaŭ kvindek jaroj klarigis tiun problemon de mondpaco, kiam Li vivis arestita, enkarcerigita, maljuste traktata en la fortikaĵo 'Akká. Li skribis pri tiu grava afero, la mondpaco, al ĉiuj grandaj regnestroj de la mondo kaj efektivigis la pacon en la rondo de Sijaj amikoj en la Oriento. La oriento troviĝis en densa mallumo, nacioj reciproke al si kondukis malame kaj malamike, religioj soifegis je sango de alia, regis nepenetrebla mallumo. Ĝuste dum tiu tempo ekbrilis Lia sankta moŝto Bahá'u'lláh kiel la suno sur la horizonto de la oriento kaj heligis Persujon per la radioj de ĉi tiuj instruoj.

Unu el Liaj instruoj estis la deklaro de la mondpaco. Homoj de diversaj nacioj, religioj kaj sektoj, kiuj sekvis Lin, tiom proksimiĝis unu al alia ke okazis rimarkindaj kunvenoj konsistantaj el homoj de diversaj popoloj kaj religioj en la oriento. Ĉiu animo partoprenanta tiajn kunvenojn vidis nur unu popolon, unu instruon, unu vojon, unu ordonon, ĉar la instruoj de Bahá'u'lláh ne estis limigitaj nur al la konstruo de la mondpaco, kontraŭe ili enhavas multajn instruojn kompletigantajn kaj subtenantajn la instruon pri la mondpaco.

Inter tiaj instruoj estas la sendependa esplorado de la vero, tiel ke la homa mondo estu savita el la mallumo de imitado kaj atingu la veron, ke ĝi forigu kaj forjetu la ĉifonitan kaj eluzitan vestaĵon de mil jaroj kaj surmetu robon teksitan en plej nobla pureco kaj sankteco per teksilo de realo. Ĉar la realo estas nur unusola, sed ne diversspeca; diversaj opinioj fine devas kuniĝi je unu.

Inter la instruoj de Lia sankta moŝto Bahá'u'lláh troviĝas la unueco de la homaro, nome ke ĉiuj homaj kreitaĵoj estas la ŝafoj de Dio kaj Li la bonfara paŝtisto. Tiu paŝtisto estas bonfara al ĉiuj ŝafoj, ĉar Li kreis ilin ĉiujn, Li edukis ilin, Li prizorgis ilin kaj ŝirmis ilin. Dubo ne eblas, ke la paŝtisto estas bonfara al ĉiuj ŝafoj. Se inter ili troviĝas sensciantoj, ili estu klerigataj; se troviĝas infanoj, ili estu edukataj ĝis ili atingos maturecon; se troviĝas malsanuloj, ili estu sanigataj. Sed estu nek malamo, nek malamikeco. Kiel bonfara kuracisto oni sin okupu pri tiuj sensciaj kaj malsanaj.

Inter la instruoj de Bahá'u'lláh troviĝas alia instruo: Religio estu la kaŭzo de kamaradeco kaj amo. Se ĝi fariĝas kaŭzo de reciproka fremdiĝo, oni ne parolu pri ĝi. Ĉar religio similas kuracilon; se ĝi pli gravigas la suferon, ĝi estas netaŭga.

Inter la instruoj de Bahá'u'lláh plue troviĝas: La religio estu konforma kun scienco kaj racio, tiel ke ĝi enfluu la homajn korojn. La fundamento devas esti solida, kaj ĝi ne konsistu el imitaĵoj.

Kaj alia el la instruoj de Bahá'u'lláh estas: Religiaj, rasaj, politikaj kaj patriotaj antaŭjuĝoj detruas la strukturon de la homaro. Tiel longe kiel tiuj antaŭjuĝoj superregas, la homaro ne kvietiĝos. Pri sesmiljara ekzisto de la homaro la historio sciigas nin. Dum tiuj sesmil jaroj la homa mondo ne seniĝis de milito, batalo, mortigo, sangavido. Dum ĉiu epoko en unu aŭ alia lando ekestis militoj, kaj tiuj militoj okazis pro religiaj, rasaj, politikaj aŭ patriotaj antaŭjuĝoj. Tiel laŭsperte pruviĝis, ke ĉiuj antaŭjuĝoj rezultigas detruon de la homara strukturo. Tiel longe kiel tiaj antaŭjuĝoj ekzistos plu, la batalo pri vivo superregos, kaj sangavido kaj rabemo daŭros. Tial la homaro, kiel okazis en la pasinteco, ne povas esti savata el la mallumo de la tera naturo kaj akiri spiritan eklumiĝon, se ĝi ne forigos la antaŭjuĝojn kaj akiros la virtojn de la Dia regno.

Se tia antaŭjuĝo kaj malamikeco estiĝas pro religio, konsideru ke religio devus esti la kaŭzo de amikeco; alikaze ĝi estus senfrukta. Kaj se la antaŭjuĝo estas nacia, konsideru, ke ĉiuj homoj apartenas al unu nacio. Ĉiuj devenas de la arbo de Adamo, kaj Adamo estas la radiko de la arbo. Tiu arbo estas unusola kaj la popoloj similas la branĉojn, dum la individuaj homoj similas la foliojn, florojn kaj fruktojn. La teritoria dispartigo inter diversaj popoloj kaj la sekvanta sangoverŝado kaj detruo de la homara strukturo devenas nur de homa nescio kaj de egoismaj emoj.

Koncerne la patriotan antaŭjuĝon: Ankaŭ tiu devenas de absoluta nescio, ĉar la surfaco de la Tero estas unusola hejmlando. Ĉiu homo povas vivi en ĉiu ajn loko de la terĝlobo. Tial la tuta mondo estas la naskiĝlando de la homo. La landlimojn kaj teritoriojn elpensis la homoj. Ĉe la kreo de l' mondo ne estis signitaj tiaj limoj kaj teritorioj. Eŭropo estas unu kontinento, Azio estas unu kontinento, Afriko estas unu kontinento, Aŭstralio estas unu kontinento, sed kelkaj animoj pro personaj motivoj kaj egoismo dispartigis ĉiujn kontinentojn kaj konsideris certan parton kiel sian propran landon. Dio ne faris limojn inter Francujo kaj Germanujo; ili estas senlimaj. Vere, dum la unuaj jarcentoj egoistaj animoj pro sia propra profito faris limojn kaj teritoriojn kaj iom post iom pli akcentis tion, ĝis fine en sekvintaj jarcentoj tio kondukis al intensa malamikeco, sangoverŝado kaj rabemo. Tiamaniere daŭrados senfine, kaj se tiu koncepto pri patriotismo restos limigita je certa cirklo, ĝi estos la ĉefa kaŭzo de monddetruo. Neniu prudenta kaj justa homo agnoskos tiajn imagitajn diferencigojn. Ni nomas iun limigitan areon nia hejmlando kaj konsideras ĝin kiel patrujon, dum ne iu malvasta spaco, sed la tuta terĝlobo estas la patrujo de ĉiuj. Koncize: nur kelkajn tagojn ni vivas sur ĉi tiu tero kaj fine ni estos entombigitaj en ĝi; ĝi estas nia eterna tombo. Ĉu valoras sangoverŝi kaj disŝiri unu la alian pro tiu eterna tombo? Ne, tute ne – nek plaĉas tia konduto al Dio nek aprobus ĝin iu ajn prudenta homo.

Pripensu! La feliĉaj bestoj neniam sin okupas pri patriotaj bataloj. Ili unuanime kune vivas en plej bona kamaradeco. Ekzemple: Se okaze renkontiĝas samtempe en unu loko kolombo el la oriento kaj kolombo el la okcidento, kolombo el la nordo kaj kolombo el la sudo, ili tuj harmonie asociiĝas. Same okazas ĉe ĉiuj pacemaj bestoj kaj birdoj. Sed la sovaĝaj bestoj, tuj kiam ili renkontiĝas, atakas unu la alian, batalas unu kontraŭ la alia kaj disŝiras unu la alian, kaj ili ne povas pace kune vivi en la sama loko. Ili ĉiuj estas malsociemaj kaj ferocaj, sovaĝaj kaj batalemaj.

Rilate la ekonomiajn antaŭjuĝojn klariĝas ke, kiam la rilatoj inter la popoloj estas firmigitaj kaj la komerca interŝanĝo estas akcelita kaj iu ekonomia principo estas aranĝita en unu lando, tio sendube influas la aliajn landojn, kaj universala bono rezultos. Kial do tiu antaŭjuĝo?

Kaj koncerne la politikajn antaŭjuĝojn: La politiko de Dio devas esti obeata, kaj estas nerefutbla ke la politiko de Dio estas pli granda ol la homa politiko. Ni devas sekvi la Dian politikon, kiu same estas aplikebla de ĉiuj individuoj. Li traktas ĉiujn individuojn egale, sen diferenco; kaj tio estas la fundamento de la Diaj religioj.

Kaj inter la instruoj de Bahá'u'lláh troviĝas la estiĝo de unu lingvo, kiu estu disvastigata ĉie inter la popoloj. Tiu ĉi instruo estis revelaciita fare de la plumo de Bahá'u'lláh, por ke tiu universala lingvo eliminu miskomprenojn inter la homaro.

Alia instruo de Lia sankta moŝto Bahá'u'lláh estas la egaleco de virinoj kaj viroj. La homa mondo havas du flugilojn: unu estas la virino, la alia la viro. Nur se ambaŭ flugiloj estas egale evoluintaj, la birdo povas flugi. Se unu flugilo restas malforta, alta flugo ne eblas. Nur kiam la virinaro kaj la viraro en la akirado de kapableco kaj perfekteco estos samrajtaj, sukceso kaj bonstato povos esti realigitaj kiel necesas.

Plua instruo de Bahá'u'lláh estas libervole dividi sian posedaĵon kun aliaj homoj. Tiu libervola dividado estas pli granda ol egaleco kaj konsistas en tio, ke la homo ne devas preferi sin mem super la aliajn, sed ke, kontraŭe, li devas oferi sian vivon kaj posedaĵon al aliaj. Sed tio ne devas esti realigata devige, ne tiamaniere ke ĝi estu deviga kiel leĝo, kiun necesas obei. Kontraŭe, la homo devas oferi posedaĵojn kaj vivon laŭ libera impulso kaj propra decido kaj memvole donaci al la malriĉulo, kiel oni faras en Persujo inter la bahaanoj.

Plia instruo de Lia sankta moŝto Bahá'u'lláh estas la libereco de la homo. Per la spirita forto li devas liberiĝi el la katenoj de la natura mondo. Ĉar tiom longe, kiom la naturo katenas la homon, li estas sovaĝa besto; ĉar la batalo por la vivtenado estas unu el la necesajoj de la natura mondo. Tiu fakto, la batalo por vivo, estas la origino de ĉiu mizero kaj ekstrema turmento.

Kaj plia instruo de Bahá'u'lláh klarigas, ke religio estas potenca bastiono. Kiam la strukturo de religio ektremas kaj ŝanceliĝas, ribelo kaj haoso sekvas kaj la ordo de la aferoj tute renversiĝas. Ĉar en la homara mondo ekzistas du gardistoj ŝirmantaj la homon kontraŭ fuŝagado: Unu estas la leĝo punanta la krimulon; sed la leĝo malhelpas nur evidentan krimon kaj ne la kaŝitajn pekojn. Male, la

ideala gardisto, la religio de Dio, malebligas ambaŭ: same la evidentan kiel la kaŝitan krimon, edukas la homon, evoluigas moralecon, devigas akiri virtojn kaj estas la universala potenco garantianta la feliĉon de la homa mondo. Sed per “religio” estas celata tio, pri kio oni certiĝas per esplorado, ne tio kio simple baziĝas sur imitado, do la fundamento de Diaj religioj, ne la homaj imitadoj.

Plia instruo de Bahá'u'lláh diras, ke la materia civilizacio, kvankam rimedo por progreso de la homa mondo, se ĝi ne estas ligita al la Dia civilizacio, ne realigos la deziratan sukceson, la feliĉon de la homaro. Pripensu! Tiuj batalŝipoj, kiuj dum unu horo el urbo faras ruinaĵon, estas la rezulto de materia civilizacio; same la Krupp-kanonoj, Mauser-pafiloj, dinamito, submarŝipoj, torpedoŝipoj, armitaj flugmaŝinoj kaj bombaviadiloj; ĉiuj tiuj militiloj estas danĝeraj fruktoj de materia civilizacio. Se materia civilizacio estus ligita kun Dia civilizacio, tiuj teruraj armiloj neniam estus inventitaj. Kontraŭe, la homa energio estus direktita tutplene al utilaj inventoj kaj estus koncentrita je laŭdindaj eltrovoj. Materia civilizacio similas la vitron ĉirkaŭ la lampo, Dia civilizacio la lampon mem. La vitro sen lumo estas malluma. Materia civilizacio similas la korpon. Ĝi eble eĉ estas ĉarma, eleganta kaj bela, tamen ĝi estas malviva. Dia civilizacio similas la spiriton. La korpo ricevas sian vivon de la spirito – aliel ĝi estus kadavro. Tiel do estas klarigita, ke la homa mondo bezonas la spiron de la Sankta Spirito. Sen la spirito la homa mondo estus senviva, kaj sen tiu lumo la homa mondo restadus en plej profunda mallumo. La mondo de la naturo estas besta mondo. Antaŭ ol la homo renaskiĝas el la besta mondo, t.e. antaŭ ol li liberiĝas el la mondo de la naturo, li esence estas besto, kaj estas la instruoj de Dio, kiuj transformas tiun beston en homan animon.

Plia instruo de Bahá'u'lláh estas la disvastigado de la edukado. Ĉiu infano estu instruata pri sciencoj kiom necesas. Se la gepatroj ne kapablas pagi la edukajn kotizojn, la komunumo devas liveri la rimedojn por la edukado de la infano.

Plia instruo de Bahá'u'lláh temas pri justeco kaj rajto. Antaŭ ol tiuj ne estas realigitaj en la mondo de l' ekzistado, ĉiuj aferoj restos senordaj kaj neperfektaj. La homa mondo estas mondo de subpremo kaj de krueleco, regno de atako kaj eraro.

Multe pli da tiaj instruoj ekzistas. Tiuj multspecaj principoj, formantaj la plej vastan fundamenton por la feliĉo de la homaro kaj estantaj pruvoj de la favoro de la Kompatema, devas aldoniĝi al la afero de la mondpaco kaj esti ligataj kun ĝi por rezultigi sukcesojn. Aliel estas malfacile efektiviĝi la universalan pacon en la homa mondo. Tiel kiel la instruoj de Lia sankta moŝto Bahá'u'lláh estas interligitaj kun la mondpaco, ili similas tablon, sur kiu troviĝas preta ĉiuspeca freŝa kaj delikata manĝaĵo. Ĉiu animo povas trovi sur tiu tablo de la nemezurebla bonfaro kion ĝi deziras. Sed se la problemo restas reduktita sole al la mondpaco, oni ne atingos la rimarkindajn rezultojn atendatajn kaj deziratajn. La amplekso de la mondpaco devas esti tia, ke ĉiuj socioj kaj religioj trovos en ĝi la realigon de siaj plej altaj aspiroj. Do la instruoj de Lia sankta moŝto Bahá'u'lláh estas tiaj, ke ĉiuj socioj de la mondo, ĉu religiaj, politikaj aŭ etikaj, ĉu malnovdevenaj, ĉu modernaj, trovos en ili esprimita siajn plej altajn aspirojn.

Ekzemple religiaj homoj trovas en la instruoj de Bahá'u'lláh la establiĝon de Universala Religio, religio perfekte konforma kun la nuntempaj kondiĉoj, reale alportanta tujan kuracon de nekurablebla malsano, kvietiganta ĉiujn dolorojn, kaj provizanta seneraran rimedon kontraŭ ĉiu mortiga veneno. Ĉar se ni, provantaj ordigi la homaran mondon, volus organizi ĝin konforme kun la nuntempe regantaj imitadoj kaj sur tio konstrui la feliĉon de la homaro, ni spertus, ke tio estas neebla kaj nefarebla. Tio validas ekzemple por la klopodo efektiviĝi la leĝojn de la Torao kaj same de la aliaj religioj konforme kun la nunaj imitadoj. Sed la esenca fundamento de ĉiuj Diaj religioj, kiu koncernas homajn virtojn kaj same estas la fundamento de la bonstato de la homa mondo, plej perfekte prezentiĝas en la instruoj de Lia sankta moŝto Bahá'u'lláh.

Simile estas rilate la popolojn soifantajn je libereco: La modera libereco garantianta la ĝeneralan bonstaton kaj subtenanta kaj konservanta kosmopolitajn interrilatojn plej potence kaj amplekse estas eksplikata en la instruoj de Bahá'u'lláh.

Same estas rilate politikajn partiojn: Tio, kio estas la plej granda politiko gvidanta la homaron, eĉ pli, la Dia politiko, estas eksplikata en la instruoj de Bahá'u'lláh.

Same koncerne al la partio por “egaleco”, kiu klopodas trovi la solvon de ekonomiaj problemoj: ĝis nun ĉiuj proponitaj solvoj pruviĝis nepraktikeblaj, krom la ekonomiaj proponoj en la instruoj de Lia sankta moŝto Bahá’u’lláh, kiuj estas praktikeblaj kaj ne kaŭzas mizeron al la socio.

Same rilate al la aliaj partioj: Se vi profunde ekzamenas tiujn problemojn, vi trovos la plej altajn aspirojn de tiuj partioj en la instruoj de Bahá’u’lláh. Tiuj instruoj konstituas la plenumpleksan potencon inter ĉiuj homoj kaj estas nepre praktikeblaj. Sed ekzistas kelkaj instruoj el la pasinteco, kiel tiuj de la Torao, kiuj hodiaŭ ne plu estas aplikeblaj. Same estas rilate al la aliaj religioj, al la tezoj de la diversaj sektoj kaj partioj.

Tiel, ekzemple, la demando de universala paco. Lia sankta moŝto Bahá’u’lláh diras, ke necesas establi Superan Tribunalon. Kvankam estas kreita la Ligo de Nacioj, ĝi ne kapablas establi universalan pacon. Sed la Supera Tribunalo, kiun Bahá’u’lláh priskribis, plenumos tiun sanktan taskon kun pleja potenco kaj forto. Lia plano celas, ke la naciaj asembleoj de ĉiuj landoj kaj nacioj – alie dirite, la parlamentoj – elektu du aŭ tri personojn, la plej preferindajn de ĉiu koncerna nacio, spertajn pri la internaciaj leĝoj kaj la rilatoj inter la registaroj, kaj kompetentajn pri la esencaj bezonoj de la hodiaŭa homaro. La nombro de tiuj landaj delegitoj estu proporcia al la loĝantaro de la lando. La elekto de tiuj personoj, elektotaj de la nacia asembleo, t.e. la parlamento, devas esti aprobita de la supera parlamento, la kongreso, la kabineto, kaj ankaŭ de la prezidento aŭ monarko; tiamaniere tiuj personoj estu la elektitoj de la tuta nacio samkiel de la registaro. El tiu rondo estu elektotaj la membroj de la Supera Tribunalo. La tuta homaro partoprenos tion, ĉar ĉiu el tiuj delegitoj estas reprezentanto de sia popolo. Se la Supera Tribunalo leĝdonas pri iu internacia problemo, ĉu unuanime aŭ plimultvoĉe, neniu preteksto por revizio restos, nek por la plendanto nek por la defendanto. En la okazo, ke unu el la registaroj aŭ popoloj malzorgus aŭ prokrastus la plenumon de la nerefutebla decido de tiu tribunalo, la ceteraj nacioj kontraŭos, ĉar ĉiuj registaroj kaj nacioj de la mondo estas ja subtenantoj de tiu plej alta tribunalo. Konsideru, kia firma fundamento tio estas! Sed per limigita kaj restriktita Ligo de nacioj la celo ne estos realigata kiel devus esti kaj necesas. Tio estas la vero pri la nuna situacio.

Konsideru la potencegajn instruojn de Lia sankta moŝto Bahá’u’lláh! Dum Li estis en la malliberejo en ‘Akká sub la premego kaj la minaco de du sangavidaj regantoj kaj spite tiun fakton Liaj instruoj disvastiĝadis tre potence en Persujo kaj en aliaj landoj. Aliflanke, se iu instruo aŭ principo aŭ komunumo estas minacata de potenco, sangavida monarko, ĝi ene de mallonga tempo estos ekstermita. Hodiaŭ kaj dum kvindek jaroj la bahaanoj en Persujo kaj en multaj regionoj estas kaj estis severe minacataj kaj turmentataj per glavo kaj lanco. Miloj da animoj oferis sian vivon en la areno de sinofero kaj pereis kiel martiroj sub la glavoj de subpremado kaj kruelo. Miloj da estimataj familioj estis elradikigitaj kaj forpeditaj. Miloj da infanoj sengepatriĝis. Miloj da filoj estis rabitaj for de siaj patroj. Miloj da patrinoj ploris kaj plendis pri siaj knaboj, kiuj estis sekapigitaj. Ĉiuj tiuj subpremo kaj kruelo, rabemo kaj sangavido povis nek malebligi nek malhelpi la disvastiĝon de la instruoj de Bahá’u’lláh. Ili disvastiĝis ĉiutage pli kaj pli kaj ilia forto kaj potenco pli kaj pli evidentiĝis.

Eble iu stulta persono inter la persoj almetos sian nomon al la enhavo de la leteroj de Lia sankta moŝto Bahá’u’lláh aŭ al la klarigoj en la leteroj de ‘Abdu’l-Bahá, kaj sendos ĝin al tiu estimata konsilantaro. Vi devas atenti pri tio, ĉu iu perso gloravida aŭ havanta alian intencon uzurpos la plenan enhavon de la leteroj de Bahá’u’lláh kaj publikigos ĝin propranome aŭ nome de sia societo kiel okazis antaŭ la milito dum la Universala Kongreso de Rasoj en Londono. Iu perso uzis la enhavon de la leteroj de Lia sankta moŝto Bahá’u’lláh kaj, enirinte la kongreson, proklamis kaj publikigis ĝin propranome, kvankam la teksto ekzakte estis tiu de Bahá’u’lláh. Kelkaj tiaj personoj iris al Eŭropo, kie ili kaŭzis konfuzon inter la popoloj kaj maltrankviligis la pensojn de kelkaj orientalistoj. Konsideru tiun fakton, ĉar eĉ ne unu vorto el tiuj instruoj estis aŭdata en Persujo antaŭ la alveno de Bahá’u’lláh. Esploru tiun aferon, por ke ĝi iĝu al vi klara kaj evidenta. Kelkaj homoj estas kiel papagoj. Ili lernas ie aŭditan melodion kaj kantas ĝin, sed ili mem ne konscias, kion ili parolas. Nuntempe en Persujo troviĝas sekto de malmultaj animoj nomata “bábí”. Ili pretendas esti adeptoj de Lia sankta moŝto Báb, sed tute ne konas Lin. Ili havas kelkajn esoterajn doktrinojn tute kontraŭajn al la instruoj de Bahá’u’lláh, kaj en Persujo oni scias tion. Sed se tiuj personoj venas al Eŭropo, ili sekrete tenas siajn proprajn instruojn kaj parolas pri tiuj de Lia sankta moŝto Bahá’u’lláh, ĉar ili scias, ke la instruoj de Bahá’u’lláh estas potencaj kaj tial ili propranome publike proklamas tiujn instruojn de Bahá’u’lláh. Rilate siajn esoterajn doktrinojn ili diras, ke ili estas ĉerpitaj de la libro Bajano verkita de Lia sankta

moŝto Báb. Se vi akiras tradukon de la Bajano, faritan en Persujo, vi eltrovos la veron, t.e. ke la instruoj de Bahá'u'lláh tute kontraŭas la instruojn de tiu ĉi sekto. Zorgu, ke vi ne ignoru tiun fakton! Se vi volas esplori la aferon pli detale, informiĝu en Persujo.

Koncize, vojaĝante tra la mondo vi ĉie ajn trovos ke progreso rezultas el asociiĝo kaj kooperado; kontraŭe ĉiu ruinaĵo avertas pri la efiko de malamikeco kaj malamo. Malgraŭ tio la homa mondo ne konscias pri tio kaj ankoraŭ ne vekigis el la dormo de senatento. Senĉese ĝi okupiĝas pri malakordo, malkonsento kaj disputado por starigi soldatarojn kaj, kun tiuj legioj, impeti sur la kampojn de sangoverŝado kaj buĉado.

Simile estas rilate al la universo kaj ĝia komponiĝo kaj malkomponiĝo, ĝia ekzisto kaj neekzisto. Ĉiu kreita estaĵo en la materia mondo estas kunmetita el multaj kaj diversaj atomoj, kaj la ekzisto de ĉiu aĵo dependas de ilia komponado. Alivorte oni povas diri: okazas kunmetado de simplaj elementoj tiel ke el tiu kunmeto rezultas aparta organismo. La ekzistado de ĉiuj estaĵoj baziĝas sur tiu ĉi principo. Sed kiam estiĝas malordo, rezultas disfalo kaj ekas malintegriĝo tiam tiu estaĵo ĉesas ekzisti. Alivorte: la neniĝo de ĉiu estaĵo estas kaŭzata per la dispartiĝo kaj disiĝo de elementoj. Tial altiro kaj komponado inter la diversaj elementoj estas la kaŭzo de vivo kaj malakordo kaj dividiĝo produktas morton. Tiel la kuntenaj kaj altiraj fortoj en ĉiuj aĵoj kondukas la la apero de fruktodonaj rezultoj kaj efikoj, dum malamikemo kaj fremdiĝo inter aĵoj kondukas al perturbo kaj neniĝo. El harmonio kaj altiro ĉiuj vivantaj organismoj kiel plantoj, bestoj kaj homoj ekestiĝas, dum el divido kaj disharmonio sekvas malkomponiĝo kaj detruo.

Sekve ĉio, kio kaŭzas harmonion, altiron kaj unuiĝon inter la homoj, estas rimedo por la vivo de la homa mondo, kaj kontraŭe ĉio, kio kaŭzas malkonsenton, repuŝon kaj disigon, kaŭzas la morton de la homaro.

Kaj se vi preteriras ĝardenon, en kiu bedoj kaj plantoj, floroj kaj dolĉe odorantaj herboj abunde kune kreskas, tiel ke ili formas unu harmonian tuton, tio estas pruvo, ke tiu plantaĵo kaj tiu rozĝardeno estas florantaj sub la zorgo de kompetenta ĝardenisto; dum se vi vidas ĝardenon senordan, nearanĝitan kaj senkulturan, tio atestas pri tio ke tie mankas la prizorgo de kapabla terkultivisto kaj per tio aperis fiherboj kaj loloj.

Tial do evidentiĝas, ke kamaradeco kaj harmonio indikas la trejnadon de la Vera Edukisto, dum kontraŭe disigo kaj separo pruvas sovaĝecon kaj mankon de dia edukado.

Kritikanto eble objetas dirante ke la popoloj, rasoj, triboj kaj komunumoj de la mondo havas malsamajn kaj diversajn kutimojn, morojn, gustojn, temperamentojn, inkliojn kaj ideojn, ke pensoj kaj opinioj sin reciproke kontraŭas, kaj kiel do povas ebligi vera unueco kaj perfekta akordo inter homaj animoj?

Responde ni diras, ke diferencoj estas duspecaj: La unua gvidas al detruo, kaj tio similas la malamikecon inter militantaj nacioj kaj konfliktantaj triboj, kiuj provas detruigi unu la alian, ekstermantaj reciproke la familiojn, senhavigantaj trankvilon kaj komforton unu de alia kaj kaŭzantaj sangoverŝadon kaj rabadon. Tio estas mallaŭdinda. Sed la alia diverseco konsistas el varieco kaj esence estas perfekteco kaj estigas diajn donacojn.

Konsideru la florojn de ĝardeno: Kvankam diversspecaj laŭ koloro, formo kaj aspekto, ili tamen refreŝiĝas per la sama akvo el unu fonto, reviviĝas per la sama vento kaj fortiĝas per la radioj de la sama suno; kaj tiu varieco kaj tiu diverseco pligrandigas ilian ĉarmon kaj belecon. Tiel, kiam la unuiga forto, la penetra influo de la Vorto de Dio efikas, la diferencoj de moroj, kutimoj, sintenoj, ideoj, opinioj kaj temperamentoj ornamas la homan mondon kaj tio estas laŭdinda. Tiu diverseco kaj varieco do estas kiel la nature kreita diverseco kaj varieco de la membroj kaj organoj de la homa korpo, el kiuj ĉiu kontribuas al la beleco, efikeco kaj perfekteco de la tuto. Kiam tiuj diversaj membroj kaj organoj submetiĝas je la kontrolado de la suverena homa animo kaj la potenco de la animo trapenetras la organojn kaj membrojn, la arteriojn kaj vejnojn de la korpo, tiam malsameco fortigas harmonion, diverseco estas la kaŭzo de unueco kaj multeco estas la plej granda faktoro por kunordiĝo.

Kiel malplaĉa estus por la okulo se la ŝosoj kaj plantoj, la folioj kaj floroj, la fruktoj, la branĉoj kaj la arboj de tiu ĝardeno estus ĉiuj samaspektaj kaj samkoloraj! Diverseco de koloro, formo kaj aspekto pliriĉigas kaj ornamas la ĝardenon kaj grandigas ĝian efikon. Simile, kiam diversaj

pensmanieroj, temperamentoj kaj karakteroj kuniĝas sub la potenco kaj influo de unu centra aganto, la beleco kaj gloro de homa perfekteco riveliĝos kaj manifestiĝos. Nenio krom la ĉiela potenco de la Vorto de Dio, kiu regas kaj transcendas la realecon de ĉiuj aĵoj, kapablas harmoniigi la diverĝantajn pensojn, sentojn, ideojn kaj konvinkojn de la homoj. Vere, estas ĝi la penetra potenco en ĉiuj aĵoj, la movanto de animoj kaj la kuniganto kaj reguliganto en la homa mondo.

Laŭdata estu Dio! Hodiaŭ la splendoro de la Vorto de Dio iluminas ĉiun horizonton kaj el ĉiuj sektoj, rasoj, triboj, nacioj kaj komunumoj kunvenis animoj sub la ombro de unu Vorto, kunvenigitaj, unuigitaj kaj samopiniaj en perfekta harmonio.

Antaŭ iom da tempo, dum la milito, letero estis skribita rilate la instruojn de Bahá'u'lláh, kiu eble taŭge estu aldonita al tiu ĉi epistolo.

\* \* \*

Ho popoloj de la mondo! La Suno de l' Vero leviĝis por lumigi la tutan Teron kaj por spiritigi la komunumojn de l' homoj. Laŭdindaj estas la rezultoj kaj la fruktoj de tio, abundaj la sanktaj evidentoj, kiuj devenas de tiu ĉi graco. Tio ĉi estas korfavoro senmakula kaj plej pura malavaro; estas ĝi lumo por la mondo kaj ĉiuj ĝiaj popoloj; estas ĝi harmonio kaj kamaradeco kaj amo kaj solidareco; vere, estas ĝi kompatato kaj unueco kaj la finiĝo de fremdeco; estas ĝi la unuiĝo, en kompleta digno kaj libereco, kun ĉiuj surtere.

La Benita Beleco diras: „Estas vi ĉiuj la fruktoj de unu arbo, la folioj de unu branĉo.“ Tiel Li similigis tiun ĉi mondon kun unuopa arbo kaj ĉiujn ĝiajn popolojn kun ties folioj, floroj kaj fruktoj. Necesas por la branĉo elkreski kaj por la folio kaj frukto flori kaj je la interkonektiteco de ĉiuj partoj de la mondo-arbo dependas la prospero de folio kaj floro kaj la dolĉeco de la frukto.

Pro tiu ĉi kialo devas ĉiuj homaj estaĵoj forte sin reciproke subtenadi kaj serĉadi senfinan vivon; kaj pro tiu ĉi kialo devas la amantoj de Dio en tiu ĉi materia mondo fariĝi la korfavoroj kaj la benoj alsenditaj de tiu pardonema Reĝo de la regnoj viditaj kaj neviditaj. Purigu ili sian rigardon kaj ekvidu la tutan homaron kiel foliojn kaj florojn kaj fruktojn de la arbo de l' estado. Zorgu ili ĉiam esti afabla al iu el siaj kunuloj, elmontri al alia amon, atenton kaj zorgeman helpon. Neniun ili konsideru sian malamikon kaj por neniun ili deziru malbonon, sed ili konsideru la tutan homaron kiel siajn amikojn, konsideru la fremdulon kiel intiman proksimulon, la eksterlandanon kiel kompanion – sen ia antaŭjuĝo, sen fari limojn.

Hodiaŭ estas tiu favorata je la Sojlo de l' Sinjoro, kiu cirkuligas la pokalon de l' fideleco, kiu donacas eĉ al siaj malamikoj la juvelon de l' malavaro kaj etendas helpan manon eĉ al sia subpremanto falinta, estas li, kiu eĉ al la plej severaj el siaj malamikoj montriĝas amanta amiko. Tio ĉi estas la instruoj de la Benita Beleco, tio ĉi estas la konsiloj de la Plej Granda Nomo.

Ho karaj geamikoj! La mondo militas kaj la homa raso troviĝas en agonio kaj morta batalo. La nigra nokto de l' hato venkis kaj la lumo de bona kredo estingiĝis. La popoloj kaj idoj de l' Tero akriĝis siajn ungojn kaj ĵetas sin unu kontraŭ la alia. Estas la fundamento mem de la homa raso, kiu estas detruata. Estas miloj da hejmoj, kiuj estas vakaj kaj senpropriigitaj kaj ĉiu jaro vidas milojn kaj milojn da homaj estaĵoj ruliĝantaj en sia vivsango sur polvaj batalkampoj. La tendoj de l' vivo kaj ĝojoj kolapsis. La generaloj generalas kaj fanfaronas pri la sango, kiun ili verŝas, konkurantaj unu kun alia je la incitado de violento. „Per tiu ĉi glavo“, diras unu el ili, „mi senkapigis popolon!“ Kaj alia: „Mi nacion faligis teren!“ Kaj ankoraŭ alia: „Mi igis registaron kolapsi!“ Pri tiaj aferoj fieras homoj, per tio ili sin gloras! Amo kaj justeco – tiuj estas ĉie cenzurataj dum harmonio kaj sindediĉo al la vero estas malestimataj.

La Kredo de la Benita Beleco vokas la homaron al sekureco kaj amo, al amikeco kaj paco; ĝi levis sian tabernaklon sur la altojn de la Tero kaj direktas sian vokon al ĉiuj nacioj. Tial, ho vi, kiuj estas la amantoj de Dio, konu vi la valoron de tiu ĉi plej kara Kredo, obeu ĝiajn instruojn, iru tiun ĉi padon rektan kaj montru vi tiun ĉi vojon al la homoj. Levu vian voĉon kaj kantu la kanton de l' Regno. Disvastigu foren la instruojn kaj konsilojn de la amanta Sinjoro, tiel ke tiu ĉi mondo ŝanĝiĝos al alia

mondo kaj tiu ĉi malhela tero inundiĝos per lumo kaj la morta korpo de l' homaro leviĝos kaj vivos, tiel ke ĉiuj animoj demandos pri senmorteco – per la sanktaj spiroj de Dio.

Baldaŭ viaj rapide pasantaj tagoj finiĝos kaj la famoj kaj riĉecoj, la komfortoj, la ĝojoj, kiujn provizas tiu ĉi rubamaso, la mondo, estos senspure forrintaj. Kunvoku vi, do, la homojn al Dio kaj invitu la homaron sekvi la ekzemplon de la Kompanio en la altoj. Estu vi amantaj patroj por la orfoj kaj rifuĝo por tiuj senhelpaj, kaj trezorejo por la malriĉuloj, kaj kuraco por la malsanuloj. Estu vi la helpanto por ĉiu viktimo de subpremado, la patrono de la malavantaĝuloj. Pensu vi ĉiam pri fari servon al ĉiu membro de la homa raso. Malatentu vi antipation kaj rifuzon, malŝaton, malamikecon kaj maljustecon: agu vi malmaniere. Estu vi sincere afabla, ne nur ŝajne. Ĉiu el la amatoj de Dio koncentru sian atenton je tio ĉi: esti la korfavoro de l' Sinjoro al la homoj, esti la graco de l' Sinjoro. Lasu lin fari bonon al ĉiu persono kun kiu kruciĝas lia pado kaj estu li helpo por tiu. Lasu lin plibonigi la karakteron de ĉiu kaj ĉiuj, kaj reorientigu li la pensadon de l' homoj. Tiamaniere la lumo de dia gvidado ekbrilos kaj la benoj de Dio lulos la tutan homaron: ĉar amo estas lumo, senkonsidere kie ĝi loĝas; kaj malamo estas tenebro, senkonsidere kie ĝi nestas. Ho amikoj de Dio! Por ke la kaŝita Mistero reveliĝos kaj la sekreta esenco de ĉiuj aferoj sin montru, vi penadu forpeli la malhelon por ĉiam kaj ĉiam.

---

## **Bahaa Esperanto-Ligo (BEL)**

**Eppsteiner Str. 89, DE-65719 Hofheim-Langenhain, Germanio**

**T +49-(0)6192-9929-16 – F +49-(0)6192-9929-99**

**<https://bel.bahai.de> – [bel@bahai.de](mailto:bel@bahai.de)**